

## La neeltenebla malpezeco de la libero

Recenzo de: *Zwischen Utopie und Wirklichkeit: konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt.* München: Allitera / BSB, 2012. – 228 paĝoj.

### Ekspozicio

La Bavara Ŝtata Biblioteko (BSB) en Munkeno estas grava universala biblioteko kun la plej granda kolekto de inkunabloj en Germanio kaj la due plej granda kolekto de periodaĵoj en Eŭropo. Okaze de la 125-jariĝo de Esperanto kaj la 100-a datreveno de la forpaso de Johann Martin Schleyer, la inventinto de Volapuko, BSB okazigis ekspozicion inter la 14-a de Junio kaj la 9-a de Septembro 2012 kun la titolo *Inter utopio kaj realo: Konstruitaj lingvoj por la globalizita mondo*<sup>1</sup>. La ekspozicio restas virtuale vizitebla ĉe:

<http://www.bsb-muenchen.de/Virtuelle-Ausstellung-Konstruierte-Sprachen.3570.0.html>

Tie oni krome povas elŝuti diversajn temrilatajn filmetojn kaj sondosierojn.

La 15-an de Junio BSB gastigis ankaŭ simpozion, kies ses prelegoj konsistigas la ĉefan enhavon de ĉi tiu “akompana volumo” de la ekspozicio. Temas pri luksa presaĵo kun apenaŭ troveblaj preseraroj. La libron enkondukas antaŭparolo de la ĝenerala direktoro de BSB, Rolf Griebel, kiu koncize skizas la historion de planlingvoj kaj la fonon de la ekspozicio. Takton li montras uzante la esprimon “hereda” (hereditär) lingvo anstataŭ natura, nacia aŭ etna. La volumon finas prinotita baza bibliografio pri interlingvistiko kaj esperantologio kaj 24 paĝoj kun koloraj fotoj de iuj el la ekspoziciaĵoj. Montriĝis ke la prelegoj bezonas tre malegalan kvanton da komentoj en recenzo, do ili ĉi tie ne estas traktitaj laŭ la origina ordo.

### La prelegoj

La plej erudicia el la prelegoj estas tiu de la literatura profesoro Gerhard F. Strasser. Lia artikolo temas pri la filozofiaj planlingvoj; li en 1988 publikigis la libron “Lingua universalis” pri tiu sama temo. La artikolo resumas la fontojn de la filozofiaj lingvoj de la 17-a jarcento: la ekscio pri la Ĉina skribo en Eŭropo; la ellaborado de helplingvoj uzataj de Katolikaj misiistoj (ekzemple *Lingua Geral* en Brazilo); la spertoj el instruado de surdmutuloj, relative oftaj en la endogamia Hispana nobelaro; ĉifroj uzataj dum la religiaj militoj; stenografio disvastiĝinta kiel notado de predikoj en la Reformacia Anglio; kaj fine la Kartezia-Lejbnica revo pri la kreo de perfekta lingvo, kies objektiva analizo de la realo povus fini religiajn disputojn unu fojon por ĉiam.

Tre bona estas ankaŭ la artikolo de Herbert Mayer, gvidanto de la Kolekto por Planlingvoj en la Aŭstria Nacia Biblioteko, al kiu estas ligita la Internacia Esperanto-Muzeo. Li tiel verve rakontas pri la historio kaj nuntempa aktiveco de sia laborloko ke oni vere ekdeziras viziti Vienon. Nur estas iom misgvida aserto sur p. 152, kie la 1920-aj jaroj estas priskribitaj kiel flortempo de Esperanto. Tian impreson oni facile ricevas precipe en la Germanlingvaj partoj de Eŭropo, sed ekzemple en Danio la movado vere ekfloris nur en la 1930-aj jaroj, ĝuste kiam ĝi komencis esti malpermesata en la totalismaj ŝtatoj – kaj eble iugrade ĝuste pro tio. Simila fatalisme rezignacia sinteno pri la neekspluatitaj ŝancoj de la 1920-aj esprimiĝas ankaŭ en la aliaj artikoloj.

Entute la kvar ceteraj artikoloj havas nur la duonon de la valoro kiun ili devus havi, kvankam la aŭtoroj rajtas nomi sin specialistoj en la koncernaj kampoj. Estas aparte bedaŭrinde diri tion pri Reinhard Haupenthal, kiu estas gvida aŭtoritato pri volapukologio, la animo malantaŭ la tuta

---

1 Titolo en Esperanto sur la retpaĝo; la libro estas nur en la Germana kaj la citaĵojn el ĝi mi mem tradukis. /JSL

ekspozicio kaj liverinto eĉ de du el la prelegoj. Li estas bibliotekisto pli ol lingvisto, kaj la grandan materialon, kiun li kolektis kaj grandparte reeldonigis dum la lasta duonjarcento, li interpretas inteligente, sed grandparte ne vere kompetente.

## **Interlingvistiko kaj Volapuko**

La unua artikolo de Hauptenthal, “Kio estas interlingvistiko kaj kiucele oni okupiĝas pri ĝi?”, traktas detale la rilaton inter interlingvistiko kaj esperantologio. Ĝi lojale prezentas la vidpunkton de Paul Neergaard, laŭ kiu interlingvistiko estas la “kompara” branĉo de esperantologio, kaj prave notas ke Neergaard forgesis inkluzivi literatursciencon inter la aliaj branĉoj. Hauptenthal tamen preferas la difinon de Otto Jespersen, laŭ kiu interlingvistiko estas simple kreado de internaciaj helplingvoj. Laŭ Jespersen, tio kompreneble okazu sur scienca bazo, aplikante la rezultojn de la lingvistika kampo hodiaŭ konata kiel lingvaj universalajoj kaj lingvotipologio<sup>2</sup> – sed pri tia kampo Hauptenthal havas nenian ideon, kaj tio estas grava malavantaĝo de lia artikolo.

Alia esprimo de la sama malforto estas nescio uzi tondilon. Interlingvistiko (egale ĉu oni uzas la difinon de Neergaard aŭ de Jespersen) ne estas memstara scienco: por ke interlingvistika verko meritu mension en tiel vastpublika eldonaĵo kiel la recenzata, la kriterio devas esti ke *aŭ* iam ekzistis ia *movado* ĉirkaŭ la koncerna lingvo, *aŭ* la aŭtoro de la lingvo estu konata pro io *krom* tiu aŭtoreco mem. Precizan sekcon oni ne povas antaŭdifini, sed ĉi tiu artikolo mencias ne malpli ol sep planlingvojn pri kies aŭtoroj oni eĉ ne konas la daton de naskiĝo kaj/aŭ morto! En la spiona medio, mi kredas, oni nomas tion “konfuzado per troinformado”.

Krome, eĉ se oni limigas sin al la agnoskendaj nomoj, tio ne signifas ke ĉiam temas pri fidindaj personoj. Ekzemple, iam en du polemikaj artikoloj<sup>3</sup> Otto Jespersen esprimis la opinion ke la internacia lingvo devus uzi ion similan al la multlingve konata Latinaĵo *etcetera* (*etc*) anstataŭ *kaj tiel pli* (*ktp*). Ĉar apenaŭ povas temi pri la sama preseraro en du malsamaj lokoj, tio pruvas ke Jespersen estis longe aliĝinta al Ido antaŭ ol noti – se iam li notis – la diferencon inter *pli* kaj *plu* en Esperanto (respektive *plu* kaj *plus* en Ido)! Sian artikolon Hauptenthal finas per listo da dezirindaĵoj, pri kiuj oni ĝenerale povas nur konsenti, sed mankas en la listo ke la kribrado kaj analizado de la fontoj en interlingvistiko okazu multe pli kritike ol kutime ĝis nun.

La malfortoj de Hauptenthal estas malpli ĝenaj en lia dua artikolo, “Johann Martin Schleyer (1831–1912) kaj lia planlingvo Volapuko”. La sola kritikinda punkto estas sur p. 71, kie laŭ Hauptenthal planlingvo kiel Volapuko aŭ Esperanto “kontraste ekzemple al la Angla, povas tuŝi la korojn”. Persone mi povas senti min ege kortuŝata de la Angla, kvankam ĝi ne estas mia gepatra – precipe, sed ne nur, kiam mi uzas ĝin por informi pri Esperanto! Oni povas uzi la internacian lingvon por sentemigi sin pri la belo de *ĉiuj* lingvoj, sed la problemo estas ke en iuj medioj tio ankoraŭ povas krei same sektecan impreson kiel nura laŭdegado de Esperanto. – Mi lernis tre multe per ĉi tiu artikolo, kaj multaj informoj el ĝi taŭgas por pliriĉigi la jam ampleksan artikolon pri Schleyer en la Germana Vikipedio. Tamen ĝi ne enhavas ĉiujn informojn interesajn al internacia publiko, kio instigis min al plua serĉado. Tial mi ŝatus doni resumon de miaj lernaĵoj ĉi tie.

Ke Schleyer estis famiĝonta kiel planlingva aŭtoro estas unuavide sufiĉe surprize. Li naskiĝis kaj vivis en la grandprinclando Badeno (nun parto de Baden-Virtembergo), kreita post la Napoleonaj militoj kun limoj al Francio kaj Svislando. Kvankam Badeno estis inter la plej liberalaj partoj de la estonta Germanio, Schleyer estis tre konservativa, eĉ reakcia Katolika pastro. Malkiel la plimulto de Germanaj ekleziuloj, li en 1870 akceptis la novan dogmon pri enofica neeraripovo de la papo. La

2 Baza lernolibro estas Bernard Comrie: *Language universals and linguistic typology*, 2. eld. University of Chicago Press, 1989.

3 Temas pri prelego al la Dana Poŝtista Kongreso 19-jun-1908 kaj kroniko en la taggazeto Politiken 6-jan-1909.

sekvan jaron li ankaŭ aliĝis al la naciisma propagando per la poemaro “*Bellona*: patriotaj militaj kanzonoj kaj baladoj”. Tamen, kvankam Schleyer estis politike reakcia kaj malliberala, li persone estis ĝentila kaj tolerema, kaj gravis al li esti filantropo. Li rilatis pli senprobleme kun Protestantoj ol kun malnovKatolikoj (kiuj ne akceptas la dogmon pri neeraripovo de la papo), kaj dum li estis pastro en Wertheim en 1860, eĉ estis konfidita al li la tenado de la Juda geedziĝ-protokolo.

La Franca-Germana milito (1870–1871) estis komencita kaj perdita de Francio. Rezulte estis dissolvita la Papa ŝtato (ĉar la Francaj trupoj protektantaj ĝin kontraŭ la Itala revolucio devis iri hejmen), la Duan Franca Imperion anstataŭis la Tria Franca Respubliko, kaj Germanio (inkluzive de Alzaco-Loreno) fariĝis imperio sub la ĝistiam Prusa reĝo Vilhelmo. Tiel Prusio ekhavis la plej fortan pozicion en la t.n. kulturbatalo, kiu temis pri la potencdivido inter la Katolika eklezio kaj la ŝtato. Siatempe Prusaj trupoj en 1849 strangolis la Badenan revolucion, kiu celis tutGermanian respublikon, kaj tiel malhelpis la lokajn kontraŭekleziajn fortojn. Sed nun la imperia registaro komencis kampanjon kontraŭ la Katolika eklezio, interalie per nova paragrafo en la krimkodo, kiu malpermesis al la pastroj prediki politike. (Tiu “Kanzelparagraph” formale validis ĝis 1953.)

Estis konfuzaj tempoj. Reĝo, poste imperiestro, Vilhelmo travivis ne malpli ol kvar murdatencojn: en 1861 (en la Badena urbo Baden-Baden – fare de studento, kiu vidis lin kiel malhelpon al Germana unuiĝo), dufoje en 1878 kaj en 1883. Li grave vundiĝis en la tria. Schleyer estis tre malfeliĉa pri la tuta socia evoluo, kaj en flamaj paroladoj li atakadis la “skurĝojn” de sia tempo, nome komunistoj, ateistoj, malnovKatolikoj kaj interkonfesiaj geedziĝoj. En 1875 la malnov-Katolikoj sukcesis kondamni lin al kvar monatoj da prizono – ironie, pro prediko kontraŭ socialismo. De tiam Vatikano havas tre favoran opinion pri li, kaj antaŭ la prizona restado oni permesis al li iri al Romo por aŭdienco ĉe la papo. Tio ŝajnas esti la plej longa vojaĝo kiun li iam faris ekster Badenon.

Schleyer ĉiam interesiĝis pri muziko kaj literaturo kaj nun iĝis diligenta aŭtoro. En la prizono li verkis dulingvan poemaron Latinan-Germanan, kaj ĉe la papa aŭdienco li ricevis benon eldoni siajn “monatajn foliojn por Katolika poezio”, nome *Sionsharfe* (“Harpo de Ciono”, 1876–1884 – notu ke la koncepto Cionismo datiĝas nur de 1890!). Kredeble ne estas hazarde ke post la prizono li venis al la paroĥo Litzelstetten, en kiu situis la somera rezidejo de la grandprinco. La grandprinca familio certe trovis kurioza tiun bonkoran, naivan kaj fervore versverŝantan pastreton, kiu iris tiom reakcien ke li revenis progresema. Ĉiuokaze, li ofte estis invitata al la grandprinca manĝotablo, kaj kelkfoje helpate de siaj paroĥanoj li distris per muziko, kantado kaj deklamado – ankaŭ en Volapuko!

Ja intertempe li ekhavis ĉiam pli da intereso pri lingvistikaj aferoj. En *Sionsharfe* li uzis meminventitan ortografion (kio tiam estis malpli eksterordinara ol hodiaŭ), kaj en 1877 li en novelo evoluigis palpan alfabeton por surd-blinduloj. En 1878 li ellaboris “mondan alfabeton”, inspirite de letero al Usono kiu revenis al unu el liaj paroĥanoj, ĉar tiu estis skribinta la adreson laŭ la prononco anstataŭ la ortografio. Kaj en Marto la sekvan jaron li subite viziis la ultimatan filantropaĵon: al unu homaro unu lingvon. Haste li kunmetis ĝin kaj diskonigis per *Sionsharfe* kaj aliaj kanaloj. Dum la sekvaj dek jaroj Volapuko kvazaŭ konkeris la mondon kaj denove perdis ĝin. Post 1890 Schleyer revenis al eldonado de religiaj beletraĵoj kaj, inspirite de sia aĝiĝo, kurackonsilaroj. Li tamen plu ĝis 1908 eldonis la centran organon *Volapükabled*. – – –

Du demandojn mi ne vidis traktitaj en la volapukologia literaturo ĝis nun:

- (1) Kiom helpis la rapidan disvastiĝon (kaj falon?) de Volapuko la fakto ke Schleyer estis konata ne kiel “mondpliboniganto”, sed pia pastro?
- (2) Se Zamenhof intencis fari ponton inter Judoj kaj Gojoj, kian ponton intencis fari Schleyer?

La duan demandon respondas p. 72, kiu montras bildon de la frontpaĝo de *Sionsharfe* Januaro 1882. Tie vidiĝas la ilustrita titolkapo de la revuo kaj la unua poemo de la numero. Dekstre en la titolkapo

estas bildigita la papo, maldekstre reĝo kun harpo (supozeble David) kaj meze Dipatrino Maria kun la Sankta Spirito super si en la formo de lumanta kolombo. En la supraj anguloj muzikas kaj kantas anĝeloj. Evidente, Volapuko devis ponti inter la eklezio de la papo kaj ties Latino unuflanke, kaj aliflanke la Germanlingva ŝtato, simbolita per reĝo David! Pia Badena Katolika pastro fine de la 19-a jarcento apenaŭ povis imagi universon konsistantan el pli ol monda, militema ŝtato kaj la sankta, pacpromesa eklezio.

Ankaŭ la poemo, “La Maria-monero”, estas sufiĉe rivela pri la pensmaniero de Schleyer. Ĝi temas pri la Aŭstra grafo Hugo Raimund von Lamberg kaj lia partopreno en la batalo ĉe Oeversee (Dane: Oversø) en la Dan-Germana milito de 1864, kie la Aŭstra kaj Dana armeoj kunfrapiĝis. Ĝi estas memorata ankoraŭ nuntempe, ĉar civitanoj de Flensburg la tagon poste en vintra malvarmego marŝis la dek kilometrojn al la batalejo kaj flegis egale la vunditojn de ambaŭ armeoj. En la poemo, la Germanaj “bravaj morton malestimantoj / la spiton de l’ Danoj je amara puno / akre kontraŭas per kraketanta saluto”. La grafo estas alpafita, sed saviĝas ĉar la kuglo trafas Aŭstran moneron kun bildo de virgulino Maria, kiun li amulete pendigis sur sin antaŭ la batalo. En ĉi tiu milito Prusio kaj Aŭstrio estis aliancanoj, sed du jarojn poste ili interbatalis pri la superrego de Germanio. Mi dubas ĉu iu poemo en *Sionsharfe* memorigas batalon de tiu milito.

## Lingvistiko kaj Esperanto

La prelego de la Viena profesoro pri hindeŭropistiko Heiner Eichner havis la iom mallertan titolon “Konstruitaj interlingvoj: ĉu defio kaj ŝanco al la lingvoscienco?”, sed ĝia ĉefa minuso estas ke ĝi ignoras la unuecon de la movado por internacia lingvo kontraste al la malunueco de la lingvistoj. 99% de tiuj kiuj kredas ke internacia planlingvo povas esti utila al ili mem aŭ al la mondo, praktikas Esperanton – neniu kohera lingvoteorio kolektas 99% de la fakuloj. Se homoj konscius pri tio, Esperanto havus masive pli grandan prestiĝon ol la lingvistiko povas esperi en sia nuna stato. Eble la interlingvistoj kaj esperantologoj estas tiel izolitaj (pri kio plendas kaj Haupenthal kaj Eichner), ke ili eĉ ne scias ke izoliteco estas la normala stato de lingvista rondo.

Kvankam Eichner ne kuraĝas esti la eta infano kiu ekkrias “Sed li ja havas nenion sur si!” kiel en la malnova fabelo pri la novaj vestoj de la imperiestro, lia artikolo estas interesa. Ekzemple ĝi montras kiel malfacile estas aserti la lingvon samtempe “natura” kaj “socia”. En la subĉapitro “Malprava naturismo” li provas denaturigi la homajn lingvojn, sed tiu sinteno donas al li problemojn kiam li provas distingi la formalajn lingvojn (logikan notadon k.s.) disde “ordinaraj” lingvoj. Se la ordinaraj lingvoj ne estas naturaj, tiam la formalaj ja devas esti artefaritaj en iu duobla senco. Kaj inverse, se oni povas mezuri la *gradon* de natureco de unuopaj lingvaj strukturoj, kiel asertas unu Germana – iom obskura kaj izolita – lingvistika skolo, tiam “paradokse laŭ tiaj kriterioj Volapuko kaj Esperanto multlilate estas pli ‘naturaj’ ol la heredaj lingvoj”. Ĥaoso povas esti fekunda, sed nur se oni konscias ke ĝi estas ĥaoso, kaj mi ne fidus ke tiu kondiĉo estas plenumita ĉi tie.

En la Esperanto-movado oni tradicie kroĉas sin al difino de la lingvo kiel nete socia fenomeno. Oni povus atendi ke tio almenaŭ vakcinus la esperantologojn kontraŭ rasismo, sed tiel bedaŭrinde ne estas. Pri la sugesto de Trubetzkoy, ke la fonologio de internacia lingvo limigu la konsonantojn al [p t k m n ŝ j s l] kaj la silabstrukturon al CV (konsonanto plus vokalo), Eichner prave komentas ke tio tro malfaciligus la rekonon de la vortoj. Sed tiam li aldonas: “Malfacile estas imagi kiamaniere tia reduktita kodo povus servi al reproduktado de la moderna civilizo kaj al plenumado de ties lingvaj postuloj”. En si mem tio estas ridinde malafabla al parolantoj de fonetike simplaj lingvoj kiel la Japana, Maoria kaj Gronlanda (kaj neintence aŭfabela ekzemple la Kartvela, Berbera kaj Rusa), sed Eichner eĉ indikas la nove malkovritan Pirahanan lingvon, parolatan de Amerika tribo ĉe rivero alflua al Amazono, kiel ekzemplon de lingvo fonetike tro malriĉa por civilizita uzo!

Ne estas facile antaŭdiri kion oni fine konkludos pri la Pirahanoj kaj ilia lingvo, ĉar la asertoj de Daniel Everett, kiu esploris ilin, estas ekstreme kontestataj. Ekzemple ili estas diskutitaj en *The Science of Language* (Cambridge University Press, 2012), kiu konsistas el intervjuoj de la Kanada filozofo James McGilvray al “la plej grava intelektulo hodiaŭ vivanta”<sup>4</sup>, nome Noam Chomsky. La libro estas pli facila ol la tekstoj kiujn Chomsky verkas mem, kaj tial nemalhavebla al ĉiu kiu deziras iom kompreni pri moderna lingvistiko. Ke Eichner bazas sin sur unu tre dubinda kritikanto de Chomsky, sed ne mencias lin mem, estas nur tro karakterize de multe tro granda parto de la hodiaŭa lingvistaro.

Post tia denunco pri scienca rasismo kaj intelekta malhonesteco, ĉu io valora restas? Surprize multe, fakte. La historio de la rilato inter lingvistoj kaj planlingvoj estas ne malbone prezentita, kaj precipe interesa estas la renkontiĝo inter la du famegaj filozofoj Rudolf Carnap (mem Esperantisto, eĉ orientiĝis pri Volapuko) kaj Ludwig Wittgenstein (pasia kontraŭulo de planlingvoj). Eichner ankaŭ liveras belegan, tre konvinkan pledon por la ebleco de poezio en planlingvo. Se li ne estus emerito, mi forte rekomendus al li labori multe pli en tiu direkto.

## Movado

La konata Esperanto-historiisto Ulrich Lins en sia artikolo “La unuaj cent jaroj de Esperanto” havas virtojn kaj malvirtojn tre similajn al tiuj de Eichner. Oni ne povas ne miri pri la elekto de personoj; dum Eichner mokas sin mem ignorante Chomsky, Lins evitas mencii la nomojn de Hector Hodler, Eŭgeno Lanti kaj Ivo Lapenna; kaj tiu de Edmond Privat aperas nur pro lia renkonto kun la Usona prezidento Roosevelt en 1908. Malgraŭ tiuj strangaĵoj, la artikolo estas tre informriĉa kaj donas agrable normalecan bildon de Esperanto, nelaste per ofta referencado al ekstermovadaj fontoj.

La ĝenerala etoso estas tiu de rezignacio: la Angla jam venkis. Esperanto estas nobla hobbio, sed havis ŝancon kiel internacia komunikilo nur kiam ĝi havis la allogon de io nova aŭ ne klare permesita. Lins eĉ esprimas nostalgion al la kondiĉoj por Esperanto en la postStalinaj orientEŭropaj “popolaj demokratioj” (minus Albanio kaj Rumanio) – li diras rekte ke la Esperantista aktiveco en GDR dum la du jardekoj post 1965 “preskaŭ allasis sentojn de envio en okcidenta Germanio”. Li kompreneble ĝojas ke “kreskanta intereso pri la historiaj radikoj de la ‘tutmondiĝo’” ankaŭ rezultas en ekstermovada okupiĝo pri la Esperanto-historio, sed tio ja ĝuste estas nur historio.

Tio tamen ne klarigas kial necesis forcenzuri la rolon de eminentuloj kiel Lapenna – kaj de la tuta Jugoslavia Esperanto-movado, kio estas tiom pli miriga ĉar orienta Eŭropo okupas en la artikolo multe pli da spaco ol okcidenta Eŭropo. Oni povus kredi ke la motivo estas simpla envio, nun ke Lins mem konfesis ke li inklinas al tiu sento; sed estas pli komplekse. Lins apartenas al la generacio kiu ne kapablis riveli la memkontraŭdirojn de Lapenna kaj surbaze de tio modifi lian doktrinon. La memkontraŭdiroj koncernas tiel fundamentajn nociojn kiel genocido kaj etnocido.

La termino genocido estis proponita en 1944 de la Pol-Juda juristo Raphael Lemkin (1900–1959) en la libro *Axis Rule in Occupied Europe*, kaj en piednoto li menciis “etnocido” kiel sinonimon. Genocido signifas la klopodon fizike elimini tutan popolon, kaj la termino estis instituciigita en UN-konvencio de 1948. La nuna signifo de etnocido kiel la klopodo *kulture* elimini popolon disvastiĝas de post 1970 el la verko *La Paix Blanche* de la Franca antropologo Robert Jaulin (1928–1996). En 1994 oni diskutis ĉu oficialigi ĝin en deklaro de UN, sed ĝi fine estis anstataŭigita per la esprimo “perforta asimilado”.

---

4 Citaĵo de Paul Robinson, politika malsamsideano de Chomsky, en *New York Times* 25-feb-1979. Pli komplete kaj en la originala lingvo: “Judged in terms of the power, range, novelty and influence of his thought, Noam Chomsky is arguably the most important intellectual alive today. He is also a disturbingly divided intellectual.”

Do, tute mallonge oni povas difini genocidon kiel malobservon de la rajto de grupo esti, kaj etnocidon kiel malobservon de la rajto de grupo esti si mem. Ŝajnas ke precipe en Francio oni estas interesita fari la distingon, dum precipe Usono rezistas instituciigi ĝin. Ĉiuokaze estas kontinuaĵo; ekzemplo de tre kruda etnocido, sed de relative malsevera genocida ago, povas esti se iu reĝimo devige sendas infanojn de malplimulto al internulejoj por anstataŭigi ilian heredan identecon per tiu de la plimulto.

Kiel la neŭtrala Esperanto-movado rilatu al la demando? Esti kontraŭ perforto estas sufiĉe facile, sed kion pensi pri memmortigo? Distingi inter murdo kaj memmortigo estas multe pli facile ol inter genocido kaj memgenocido, sed tiu lasta fakte ne estas tute absurda; ĝi estis aplikita interalie pri la reĝimo de Pol Pot en Kamboĝo (1975–1979). Plie, ĉu ekzistas io tia kiel senperforta etnocido? Kaj plej malfacile, ĉu memetnocido entute povas esti io malbona? Se oni povas akceli la unuiĝon de la homaro per libervola, netrudita asimiliĝo en pli grandan unuon, kial oni ne faru tion, tiom pli se oni estas Esperantisto?

Se oni legas la paroladojn de Lapenna<sup>5</sup>, oni ne ricevas klaran respondon, kvankam li ofte traktas la temon. Sufiĉe akra memkontraŭdiro estas sentebla se oni citas el Mainz 1958: “Eŭropo konsistas el malnovaj nacioj kun evoluantaj lingvoj, kun kulturoj kreitaj en tiuj lingvoj”, apud Linz 1965: “Kiom da fojoj oni aŭdas paroli aŭ oni legas pri ‘kulturaj’ kaj ‘primitivaj’ lingvoj! Eĉ la kulturaj valoroj, kelkfoje elstare grandaj, sed kreitaj en lingvoj de nombre malgrandaj popoloj, estas kutime subtaksataj nur tial, ĉar ili estas esprimitaj en tiaj ‘sensignifaj’, ‘primitivaj’ lingvoj.”

Estas evolu-tendenco, tamen. En Parizo 1950 eĉ “diverseco” estis negativa vorto: “la historia evoluo de la homaro ... iras de plureco kaj diverseco al konkordo kaj unueco”. Kontraste, en Helsinki 1969 la ĝeneraligita uzo de Esperanto “helpos ĉiujn naciojn, eĉ la plej malgrandajn, kaj ĉiujn etnajn grupojn, eĉ la plej etajn, konservi sian identecon”; ĝi eĉ “protektas ilin kontraŭ la lingva imperiismo, kiu ne malofte ricevas formojn de kultura genocido” – alivorte etnocido, termino ankoraŭ ne enkutimiĝinta tiutempe. Estas facile vidi ke Lapenna tenis sin ĝisdata pri etnocida teorio, kaj ke tio iom post iom distancigis lin al tiu parto la Esperantista tradicio kiu gloras mem-etnocidon, ekzemple en la vortoj de la Majstro mem: “Ni konfesas, ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kio nome konsistis la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo” (el “Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Internacia Lingvo”).

Estas tiu lasta sinteno kiu animas la Munkenan Deklaracion de 1951. Ĝi estis intencita kiel suplemento al la Bulonja Deklaracio de 1905, kaj ĝi estis akceptita same glate kiel la lastatempa ŝanĝo de la neŭtralec-paragrafo en la statuto de TEJO. Malkiel la Bulonja Deklaracio (kiun Lins kompreneble mencias), oni ne multe atentis pri la Munkena, kaj ĝi ŝajne ne havis multe da influo. Sed ili estas la solaj du deklarioj de UK, do formale ĝi estas gravega dokumento. Manifestoj, ekzemple tiu de Prago, ligas nur la subskribintojn – la deklarioj estas kolektiva memdifino.

Oni ne akceptus ĉiujn punktojn de la Munkena Deklaracio hodiaŭ, do estas diskutinde ĉu ne iu estonta UK revoku ĝin. Jen ĝia teksto:

La celo de la Esperanto-Movado estas plena apliko de la Internacia Lingvo Esperanto en ĉiuj sferoj de la internacia vivo kaj por ĉiuj internaciaj rilatoj. En tia vasta uzado de la Internacia Lingvo logike rezultos:

- (1) altiro de pli larĝaj popoltavoloj al aktiva partopreno en la internacia vivo;
- (2) progresigo de la scienco kaj plimultiĝo de la intelektaj interŝanĝoj en internacia kadro;
- (3) plifirmigo de tuthoma solidareco kaj rapidiĝo de la procezo de unueciĝo de la homaro.

---

5 Ivo Lapenna: *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*. 2-a eld. UEA, 2009.

Rilate al la dua punkto estas rimarkinde ke ne estas menciita internacia komerco. Sed la tria punkto estas simple freneza. Solidareco laŭdifine estas direktita de unu grupo kontraŭ alia, do “unueciĝo” (kial ne sufiĉas unuigi?) de la homaro signifus staton *kie solidareco ne plu havas sencon*. Krom, kompreneble, se “tuthoma” signifas ke ĝi estas direktita kontraŭ homoj kiuj havas malpli ol averaĝe da membroj aŭ organoj! Pli ĝentila interpreto estus supozi ke “tuthoma solidareco” estas simple sinonimo de *konkordo*, sed eĉ se oni uzus tiun belan, nun bedaŭrinde iom forgesiĝintan vorton, oni ne rajtus postuli pli ol *toleremon* en ĉi tiu kunteksto. Kvankam la deklaro ŝajnas firme bazita sur la Zamenhofa ne-klasbatala sennaciismo, sub la surfaco bolas la ekkonscio ke *efektive* unuigi sen konservo de diverseco (kaj, sekve, de solidareco) povus esti ia malfeliĉo al la homaro.

Notu ke en mallibereco la Esperantistoj tute ne bezonas cerbumi pri tio. En mallibera socio Esperantista solidareco ĉiam havas sencon, tute egale ĉu ĝi esprimiĝas por aŭ kontraŭ la propra ŝtato, aŭ eĉ ambaŭ samtempe. Sed la civitano kiu vivas en libera socio kaj *personne akceptas* la kondiĉojn de libereco, devas mem decidi kiam kaj kial solidari kun kiuj. Plue oni ne povas esti certa ke jam ekzistas organizaĵo por kunordigi la koncernan solidarecon, tiom pli ke ĝi tion faras bone. Do vi volas kompletigi la idealon de unueco per tiu de diverseco, ĉu? Eble eĉ difini dialektojn kiel egalvalorajn kun la naciaj normaj lingvoj kaj la internacia, tiel kiel Lapenna faris jam en Haarlem 1954? Bedaŭri memetnocidon, ĉu? Kiamaniere vi volas unuigi tion kun socia progreso, kun ekonomia egaliĝo, kun libera moviĝado trans la landlimojn, kun la forigo de kastismo, rasismo, seksismo, eĉ kun... interkonfesiaj geedziĝoj?

Ankaŭ neEsperantistoj en libereco ne bezonas cerbumi pri tiaj aferoj, ĉar en mondo kie ne ekzistas Esperanto, ne ekzistas homoj, sed nur pasivaj viktimoj de nacia identeco – ĉu la propra, ĉu tiu de pli forta kaj agresema nacio. Mallibereco ne estas daŭripova stato de socio en la nuna mondo, do se la Esperanto-movado volas progresi dum la estonteco, ĝi nepre devas fronti ĉi tiajn demandojn. Necesas difini pli precize kiom da memetnocido en kiaj kondiĉoj oni neeviteble devas toleri, ĉar ĉiu memetnocida ago kiu transpaŝas tion, estas principa agnosko ne nur de etnocido, sed de genocido. Tiu difinado absolute ne estas facila tasko, sed la libereco necesigas ĝin.

Lapenna diris kelkajn stultaĵojn dum sia vivo; ekzemple li estas la motoro malantaŭ la Munkena Deklaracio. Sed en sia vivo li povis evolui, ĉar li akceptis la defion de la libereco. Kontraste, Lins neniam diras stultaĵojn, ĉar, ne akceptinte plene sian liberecon, li sukcesas eviti diri ion novan.